

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:	Pago por anoncoj:
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 = cendoj 75	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
= frankoj 4,25 = rejsoj 1000 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

III:a jaro.

Augusto 1898.

N:o 8 (32).

Biblioteko de esperantistoj.

Niaj libroj estas tre multekostaj, ĉar estas eldonataj en tre malgranda nombro da ekzempleroj. Niaj do amikoj-esperantistoj estas ne riĉaj, aŭ tute malriĉaj homoj. Pro tio ĉi esperantistoj ne povas uzi esperantistajn librojn tiom, kiom ili volas kaj bezonas uzi. Por havi sufiĉe da materialo por legado, esperantisto devas elspezi tian grandan sumon da mono, kiun li ne povas elspezi. Prefere suferas pro manko en materialo por legado niaj novaj amikoj-esperantistoj. Nia malgranda kaj malofta gazeto ne povas kontentigi ilin, kaj ili tre bezonas librojn en lingvo internacia, por ellerni nian lingvon tute bone kaj ĉiufanke. Biblioteko de lingvo internacia kvazaŭ tute ne ekzistas por ili, ĉar ĝiaj libroj estas tre multekostaj por malriĉaj homoj. Pro tio ĉi novaj esperantistoj restas preskaŭ tute sen legado en lingvo internacia, kaj ne povas bone ellerni lingvon internacian. Ĉe tiaj kondiĉoj ilia varmeco, ilia entuziasmo kaj laboreco malvarmiĝas kaj fine jam tute perdiĝas, kaj nia nova amiko aŭ tute lasas la lingvon internacian aŭ fariĝas esperantisto nur laŭ nomo, tute indiferenta al la sorto de nia afero. Kaj tio ĉi estas tre nature: bona esperantisto povas esti nur tiu, kiu bone scias nian lingvon kaj tute komprenas nian gazeton. Krom tio, ju pli da laboro uzis homo por ia afero, des pli tiu ĉi afero estas kara por li.

Por forigi tiun ĉi mankon de materialo por legado, kiun suferas nun esperantistoj entute kaj ĉefe esperantistoj komencantaj, mi proponas aranĝi bibliotekon de esperantistoj el uzitaj libroj. Tiun ĉi bibliotekon ni povas kunmeti, oferante esperantistajn librojn (kaj gazeton); kiujn ni havas kaj kiujn ni jam ne bezonas. Preskaŭ ĉiu esperantisto, prefere niaj verkistoj, havas kelkajn tiajn librojn. Se ĉiuj tiuj ĉi libroj estus senditaj en unu lokon, tiam kunmetiĝus tre granda biblioteko, kiu enhavus ĉiujn verkojn de nia literaturo en tre granda nombro da ekzempleroj. Tiu ĉi biblioteko senpage sendus librojn por legado al ĉiu esperantisto, kiu petos pri tio ĉi. Leganto pagos nur poŝtajn elspezojn por transsendo de libroj. Li sendas en la bibliotekon ian sumon da mono kaj skribas, kiujn librojn li deziras ricevi; kaj la biblioteko sendas

al li petatajn librojn, ĝis la sendita mono estos konsumita por transsendo de libroj. Leganto sendas novan sumon da mono, la biblioteko ree sendas al li petatajn librojn kaj tiel plu. Mi pensas, ke mi ne bezonas multe paroli, kiom utila por nia afero estus tia senpaga biblioteko por esperantistoj. Tial mi ne parolu pri tio ĉi plu. Mi nur petas niajn amikojn serioze prijuĝi tiun ĉi gravan entreprenon kaj efektiviĝi ĝin eble plej baldaŭ.

Aprilo 1898.

M. S. Rakitski.

Novajoj.

Donacoj.

Por flinoj de esperantistaro (vidu N:o 3 de "L. I.") oferis: *nekonata sinjoro el Parizo* — 4 rublojn kaj 25 centimojn; *s-rino A. V. Prohoroviĉ-Koĉmareŭko* — 15 rubl.; *membroj de la Societo "Espero"* — 6 rubl. 20 kop.; *s-ro M. M. Abesgus* — 2 rubl. 45 kop.; *s-ro M. Nordensvan* — 5 rubl.

* * *

Vojaĝoj de esperantistoj.

La konata de ĉiuj esperantistoj, precipe de la malnovaj inter ili, varmkora kaj agema amiko de Esperanto en Germanujo, s-ro *W. H. Trompeter*, kiu en tiu ĉi somero vojaĝadis en la Skandinavaĵoj, faris ankaŭ al la Klubo Esperantista Upsala sian viziton en la 10:a kaj 11:a de aŭgusto. La malmultaj klubanoj, restantaj en la urbo somere, havis tiam la ĝojon persone konatiĝi kun li, interparoli pri komunaj interesoj, elsendi komunajn salutojn al samideanoj de aliaj lokoj k. t. p.

* * *

Rimarkinda projekto de Amerika gazeto.

La monata gazeto "*The Cosmopolitan*" enhavas en sia marta numero de tiu ĉi jaro tre grandan artikolon, verkitan de ĝia redaktoro, s-ro John Brisben Walker, pri internacia lingvo.

S-ro Walker, kiu multe vojaĝadis, precipe en Ĥinujo kaj Japanujo, rimarkis ne sole la malfacilaĵojn de la diverslingveco, sed ankaŭ la grandajn malsimplaĵojn kaj mallogikecojn de la naciaj lingvoj. Ilia ortografio estas nenature komplikita, iliaj gramatikaj formoj estas senregulaj, la sintakso tute malcerta kaj kaprica.

Tial fariĝis ĉe li la konvinko, ke la mondo bezonas internacian lingvon. En tio ĉi li estas tute prava.

Ni bedaŭras, ke lia artikolo, kiun li nomas "prepara laboro rilate kunigon de instruituloj por prizorgi la konstruadon de science fundamentita lingvo", estas tro granda por represi en "L. I."; ĝi enhavas multe da vero.

En 1892-a jaro li proponis aranĝadi, ĉe la Monda Ekspozicio en Ŝikago, komitaton de gravaj filologiistoj por organizadi la entreprenon, kaj formale oferis al la prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj sumon de 12,000 dolaroj por kovri la elspezojn de la komitato. Tiu ĉi entrepreno renkontis malhelpaĵojn kaj neniiĝis.

Lia nuna projekto estas tiu, ke la lingvistoj kaj scienculoj de ĉiuj landoj

kunigu siajn sciojn kaj fortojn por ellaboradi internacian lingvon, havante en sia laborado "The Cosmopolitan" kiel komunan punkton de renkonto.

La leĝoj, tie donitaj por la konstruo, ortografio kaj fonetiko k. c. de tiela lingvo estas precize la leĝoj, kiujn obeas jam Esperanto (krom tio, ke s-ro Walker postulas ankaŭ stenografiajn literojn por la lingvo).

Konkludinte el la artikolo, ke ĝia verkinto nenion sciis pri Esperanto, ni sendis al li ĉiajn sciigojn pri tiu ĉi lingvo kune kun diversaj libroj el la literaturo. Respondo ne venis.

En la entrepreno de "The Cosmopolitan" ni vidas nur simple amerikan reklamon por la gazeto — nenion pli. Estas tute klare videble, ke la redaktoro havas nenian scion pri la tuta esenco, historio kaj nuna stato de la afero, pri la tuta malfacileco kaj neplenumebleco de lia entrepreno. Similaj laŭtefrazaj entreprenoj estis jam faritaj multajn fojojn, sed ĉio ordinare finiĝadis nur per frazoj.

* * *

Pri Esperanto parolis. En la hungara gazeto "*Vasuti Lapok*" = Fervojoj Gazetoj (Budapeŝt, 10 de julio, n-ro 19) oni legas du artikolojn pri Esperanto. Unu, kies rubriko estas "világnyelv a vasutaknál" (mondlingvo ĉe la fervojoj), montras — se ni bone deĉifris la hungaran tekston — la utilon de neŭtrala internacia lingvo ĉe la eŭropaj fervojoj kaj precipe en la Aŭstra-Hungara monarĥio kun ĝia Babilona diverslingveco. Por tiu ĉi celo la verkinto, s-ro L. Jakab, oficisto ĉe la suda fervojo, rekomendas la lingvon Esperanton. La alia noto admonas la homojn konatiĝi kun nia lingvo kaj donas al ili la necesajn sciigojn pri la rimedoj ellerni ĝin.

En la semajna gazeto *Tolnamegyei Közlöny*, eldonata en Szegzárd, Hungarujo, aperis — n-ro 31 je 31 de julio — granda propaganda artikolo, verkita de s-ro Paŭlo Lengyel. Sendube estas interesa por la legantoj sciigi, ke la redakcio de L. I. ricevis en tiu ĉi printempo la unuan leteron de s-ro L., datitan je la 19 de marto kaj finitan per la peto, ke ni pardonu ĝiajn eblajn erarojn, ĉar la skribinto vidis *nur antaŭ du tagoj* la gramatikon de Esperanto. Post tiu tempo ni ricevis ne malmulte da leteroj de s-ro L., ĉiuj skribitaj en bona Esperanta lingvo. La dirita artikolo komenciĝas tiel:

"Kiu ne aŭdis jam pri la lingvo Volapük? Kiu ne konas ties celon?"

"La Volapük (mondlingvo) intencis esti tia rimedo, per kiu la filoj de diversaj nacioj komprenas unu la aliajn. La celo estis do aliĝinda kaj — oni povas diri — sankta. Sed la estinta rimedo estis bedaŭrinde ne oportuna por tiu ĉi celo.

"La Volapük estis ne vivema pro ĝia malfacila, mallogika esteco. Kaj ke ĝi tamen tre disvastiĝis, tio okazis tial, ĉar oni ne havis ion pli bonan; kion pravigas ankaŭ tiu cirkonstanco, ke la stelo de Volapük tuj defalis de l' ĉielo de la internacieco, kiam la lingvo Esperanto estis kreita; la lingvo Esperanto estas kiel la akra tranĉilo kun simpla tenilo, kaj fabrikita el ŝtalo, — dume la Volapük estis kiel la tranĉileto kun ora ornamo kaj konka tenilo, kun cent branĉoj, inter kiuj estis tondilo, unĝobroso, korko-eltirilo, raspilo, forko, eble ankaŭ hundskurĝo kaj fotograf-aparato, sed tranĉilo ne.

"Estas do superflua paroladi pri la celo de la lingvo Esperanto. Tiel la granda publiko, kiel eminentaj scienculoj sentis ties neceson. Kaj la tuta klera mondo akceptis kun laŭdo Esperanton antaŭ 10 jaroj komunikitan, je kies kreo la rusa scienculo d-ro Lud. Zamenhof pli ol dek jarojn laboradis.

"Kiel la lingvo Esperanto estas vivema, ties plej brilanta praviĝo estas ĝia universala disvastiĝado. En ĉiuj 5 mondpartoj ekzistas jam esperantistoj, kaj estas efektive mira, ke en Hungarujo ĝis nun neniu sciigis pri estanteco de l' lingvo, kaj sekve neniu havis okazon je ties disvastigado." —

Post tio ĉi la aŭtoro sciigas pri la esperantistaj gazetoj kaj kluboj, kaj daŭrigas:

"La enporto de l' lingvo Esperanto en nian patrujon estas indo de l' universitata profesoro d-ro Gabr. Bálint, scienculo posedanta 14 lingvojn, — kaj de s-ro Abelo Barabás, redaktoro de l' ĉiutaga politika gazeto "Ellenzék" en Kolozsvár. La pli poste nomata eldonis ankaŭ lingvolibron, per kiu la lingvo estas tute lernebla...

"La kaŭzo de disvastiĝado de l' lingvo Esperanto estas ĝia facila lernebleco, saĝega logiko kaj belega sono. La tuta gramatiko estas kopiebla sur 1/2 folio da

papero kaj lernebla en 2—3 horoj. La vortaro konsistas ĉefe el latinaj, germanaj kaj francaj vortoj, kiujn konas ĉiuj kleraj komoj; ĝi enhavas ne pli ol 1,000, diru: mil vortojn. Per tiuj ĉi mil vortoj oni povas ĉion esprimi ĝis la plej malgrandaj detaloj, eĉ pli delikate, ol en kiu ajn vivanta lingvo.

“Por ke Vi, estim. legantoj, koneton havu pri la fabla facileco kaj logiko de l’ lingvo, mi prezentas al Vi kelkajn regulojn de Esperanto.” —

Prezentinte la esencon de la gramatiko kaj laste unu leteron Esperantan li finas la artikolon per la vortoj sekvantaj:

“Post prezentado de tiuj ĉi ekzemploj la lingvo Esperanto ne bezonas laŭdon. Estas certa, ke ĝi havas grandegan estontecon, kaj malgraŭ ke ĝi nun ankoraŭ bataladas kun la malfacilaĵoj de l’ komenco kaj kun antaŭjuĝoj, estas tamen certe esprebla, ke ĝin post 10 jaroj havos la tuta klera mondo kiel universalan havon, kaj la homaro venos je unu paŝo pli proksime al la profetaĵo de Kristo, ke: “unu sola ŝafejo, unu sola ŝafisto.”

— Inter la “Popolaj-sciencaj artikoloj de la societo Verdandi“ en Upsala aperis unu artikolo, sub la rubriko: “Pri la provoj krei internacian lingvon“, verkita de s-ro S. E. Krikortz, med. kand. La artikolo estas raporto pri la historio de tiu ĉi ideo, pri la projektoj por efektiviĝi la ideon kaj pri Esperanto kiel ĝia fina solvo. La pli gravaj trajtoj de la lingvo estas prezentitaj per bonaj ekzemploj kiel ilustracioj kun informata teksto. La dirita artikolo estas unue presita en *Upsala Nya Tidning* n-ro 1171, kaj la sekvantaj svedaj gazetoj represas la artikolojn de la societo “Verdandi“: *Alingsås Tidning, Arbetet, Bohuslänningen, Bergslagsbladet, Eskilstuna-Kuriren, Folkbladet, Folkets Tidning, Gefle Dagblad, Göteborgsposten, Karlstadstidningen, Korsresp. Landskrona Tidning, Kristinehamnstidningen, Nerikes Allehanda, Norrbottens Nyheter, Småland, Socialdemokraten, Sundsvalls Tidning, Söderhamns-Kuriren, Södermanlands Nyheter, Öresundsposten, Östersundsposten, Östgöten.*

— La rusa gazeto “*Smolenskij Vjestnik*“ (Kuriero Smolenska) komencis presadi diversajn sciigojn pri la lingvo Esperanto. N-ro 154 enhavas la leteron de Lev Tolstoj, trovatan en ĉiuj propagandaj broŝuroj; n-ro 155 enhavas sciigon pri la formiĝo de loka esperanta rondeto. Jen estas laŭvorta traduko de tiu ĉi sciigo, presita en la rubriko “mallonga taglibro“ kaj subsignita de Aleksandro T—v:

“La lernado de Esperanto kaj vastigado de ĝi estas sendube kristana afero kiu helpas al la kreado de la Regno de Dio sur la tero. Lev Tolstoj.

“En Smolensk fariĝis rondeto de inteligentaj personoj, kiuj sin turnis kun peto pri la permeso fondi en S. filion de la S.-Peterburga societo “Espero“. La peto estis subskribita de 17 “membroj-fondantoj“; en tiu nombro estis ss. Engelhardt, Pilecki, Zakrjevski kaj aliaj. La societo “Espero“ havas la celon helpi al la vastigado de la lingvo internacia “Esperanto“ kaj doni al ĉiuj personoj, interesantaj sin je tiu ĉi lingvo, eblon de la plej proksima kuniĝo. Tiel estas dirita en la regularo de l’ societo. En la nuna tempo ellernado de la lingvo “Esperanto“ rapide sin movas antaŭen, kaj ĝi havas jam sufiĉe grandan literaturon. Ekzemple per la lingvo “Esperanto“ estas tradukita “Iliado“, “Hamleto“, “Kain“, “Demono“ kaj aliaj. En mallongaj sciigoj pri Esperanto estas dirita, ke “Esperanto“ servas “por la internaciaj komuniĝoj, por la literaturo kaj societa scienco, por la forigo de la baroj inter la popoloj, kiuj farus ĉiuj unu grandan fratan homan familion.“ Tiaj problemoj meritas plenan atenton, kaj oni ne povus al ili ne konsenti. Certe “Esperanto“ ne povas kaj ne celas forpeli la naciajn lingvojn. Ellerni paroladi kaj skribadi en tiu ĉi lingvo estas tre facile, des pli, ke antaŭ tri jaroj estis eldonita en Varsovio plena rusa-esperanta vortaro kaj lernolibro de tiu ĉi lingvo.

“La filio en Smolensk sin gvidos, kun malmultaj esceptoj, per la regularo de la peterburga societo kaj ankaŭ aranĝados praktikajn literaturajn kaj artistajn vesperojn kaj kolektiĝojn, sistemajn kursojn, volas eldonadi librojn kaj broŝurojn en la lingvo “Esperanto“, malfermadi bibliotekon k. t. p. Ni deziras al la smolenskaj esperantistoj plenan sukceson. En ĉiu okazo oni ne povas ne salutadi similan simpatian projekton.“

— En n-ro 371 de la plej granda sveda gazeto *Stockholms Dagblad* aperis bela traduko de la delikata Fantazio “Radio de Amo“, kiun verkis fraŭlino A. Proĥoroviĉ-Koĉmarenko por la februara numero de nia gazeto. S-ro V. Langlet, kiu nun estas kunlaboristo ĉe *Stockholms Dagblad*, faris la tradukon kun noto, ke ĝi estas tradukita el Esperanto.

-- La portugala gazeto *O Commercio do Porto* n-ro 176 enhavas longan artikolon tradukitan de d-ro Costa e Almeida el la Esperanta originalo de s-ro K. Ostanieviĉ

pri la festa kunveno de la Societo Imperia de Geografio en S. Peterburgo en honoro de Vasco da Gama.

— N-roj 6 kaj 7 de *O Philatelisto do Occidente* enhavas artikolojn filatelistajn en Esperanto kaj anoncojn pri la portugala lernolibro de d-ro Costa e Almeida.

— Unu ĉiutaga belga gazeto *Le Matin* — eldonata en Anverso — amuzas siajn legantojn, en n-ro 190, per ŝerca kroniko tuŝante lingvon universalan, kiu laŭ la opinio de l' verkinto devas esti ne "Volapo" aŭ "Esperantuk", sed la — muziko. Ĉar, kiom da homoj komprenas tiujn lingvojn, "Volato" kaj "Esperanpuk"? La muzikon tamen ĉiuj komprenas, ktp. La ŝerco estas farita en bona humoro kaj neniun ofendas.

— *La Plume Sténographique*, monata stenografia gazeto, eldonata en Limoges, Francujo, sub la redaktado de s-ro F. L. Canet, esperantisto, enhavas en n-ro 50 noton pri L'Espérantiste kaj sciigon, ke la redakcio de *La Plume Sténographique* ricevis de ĉiuj flankoj petojn je informoj pri nia lingvo. La artikoleto diras interalie: "La nomo de d-ro Zamenhof estas de hodiaŭ senmortema por ĉiam, kaj ni ne timas certigi, ke Esperanto estas difnita por fariĝi baldaŭ la plej potenca aganto de civilizacio kaj kompreniĝo en la mondo civilizita."



La malhelpita bigamio.

— Ŝerca historio. —

Sinjoro Molnár, la riĉa, sed avara hungara sekretario, rimarkis, ke liaj vinoj konsumiĝas je pli granda mezuro, ol li konsumadas ilin.

— Mi havas doman ŝteliston, — murmuris li al si. — Sed gardu sin li, ĉar li rapide enfalos en mian kaptilon.

Lia suspekto falas sur lian servanton, sur la diboĉeman, drinkeman Miska*). Sinjoro Molnár volis lin surprizi en la ŝtelo, tial li faris planon por atingi sian celon.

Je duona horo antaŭ la tagmanĝo li rapidis en la kelon kaj kaŝis sin. Li sciis bone, ke Miska baldaŭ venos por alporti vinon al la manĝo. Kaj la saĝa sekretario bonege kalkulis...

Li aŭdis paŝojn. Miska venis.

La servanto prenis unu vinan botelon, levis ĝin supren kaj entuziasme elokventis:

— Alestanta Szomjas**) Miska deziras edzinigi alestantan fraŭlinon Ruĝan Vinon, naskitan en Szegzárd, — kaj ĉar neniu havas kontraŭdiron, la edzigo estos tuj efektivigita.

Kaj li eltrinkis la vinon, ĵetis la botelon flanken kaj alian prenis en la manon, kion li portis sur la tablon.

Sinjoro Molnár forpremis sian koleron. Li tagmanĝis bone, sed post tio vokis la servanton.

— Ĉu volas vi esti en edziga festeno?

— Tre volonte, sinjoro.

— Venu do, — diris la sinjoro, malkroĉante la skurĝon de l' najlo.

Poste li daŭrigis:

— Alestanta Szomjas Miska deziras edzinigi alestantan fraŭlinon Skurĝon, naskitan en Hamburg, kaj ĉar neniu havas kontraŭdiron, la edzigo estos tuj efektivigita.

Kaj li levis la skurĝon por bato.

*) Legu: Miŝka. — Esperante: Miŝaeĵo. **) == soifanta.

Miska saltis rapide flanken.

— Haltu, sinjoro, mi havas kontraŭdiron!

— Ha, fripono! — kriegis sinjoro Molnár, — ĉu mian vinon ne vi eltrinkadis?

— Tial ĵus, — respondis tiu, — *mi havas jam edzinon*, mi volas ne fari bigamion.

La sinjoro ridis je la sprito kaj pardonis al li. Sed post tiu ĉi tago portadas la vinon por manĝo de l' sinjoro Molnár la ĉambristino.

Paŭlo Lengyel.



Pri traduko de la Sankta Skribo.

En tiu ĉi jaro estas enportita la demando pri tiu traduko de s-ro M. Rakitski. En l' artikolo li eldiris ke la Sankta Skribo laŭ riĉeco, profundeco kaj grandeco de pensoj staras multe pli alte, ol ĉiuj aliaj libroj. Mi tute konsentas; pensoj de la Sankta Skribo estas senfine altaj. Sed... por kio ĝin traduki en nian karan lingvon. En Esperanton estas necese traduki produktajojn, kiuj estus utilaj aŭ por legantoj konigante ilin kun elstarantaj verkoj, aŭ por la lingvo riĉigante ĝin kaj farante pli flekseblan, sed se en ĝin traduki Sanktan Skribon, estos atingita nek l' unua, nek la dua celo, ĉar neniu eĉ komencos legi: se iu ekvolos tralegi tiujn librojn kaj esti droninta en profundeco de iliaj pensoj, li pli baldaŭ tralegos en sia nacia lingvo, kaj en kiun el naciaj lingvoj ili ne estas tradukitaj? Traduki ilin por pliriĉigi la lingvon ankaŭ ne estas necese: traduku tiom multe da libroj ne de la Sankta Skribo, kaj la lingvo pliriĉigos neniom malpli. Stilo de la antikvaj lingvoj distingiĝas per simpleco, forto kaj mallongeco de l' esprimado, sed en nia tempo ĝi ne povas ekzisti, ĉar ĝi ne estas konforma rilate la spirito de nia tempo; tial ĝi ankaŭ ŝanĝiĝis. — Nun tiaj esprimoj ŝajnas malnaturaj, artefaritaj; kaj multaj vortoj ankaŭ neestiĝis. — Por kio sin turni al antikvaĵo, kiam ĉe ni estas multe da novo, povanta alporti pli multe da profito. — Kaj kiom da peno, kiom da mono kaj tempo postulas jena laboro neproduktanta utilon! — Kiom da bono anstataŭ tio estus farebla! Kie do estas utilo de jena traduko?! — Traduki do, por ke estus direble, ke en nian lingvon estas tradukita eĉ la Sankta Skribo, ne estas saĝe, ĉar ĝi similus je tio, kiel avarulo estas kontenta, ke li estas riĉa, kiam lia riĉeco al neniu utilas.

Simferopol, 27 de julio 1898.

V. Tacievski.



Kontraŭfakcio en XIII-a centjaro.

de **Adrien van Meersel.**

Unu vesperon en Venizo ia homo eniris en la laborejon de Marko Antonio Raimondi.

La homo, kiu ŝajnis ekscitita de kelkaj koleraj pensoj, kuntenataj ne sen peno, rapide sidiĝis sur unu el la seĝoj de la laborejo kaj demandis junan lernanton, prilaborantan kupran tabulon, ĉu estas hejme Marko Antonio.

La lernanto levis la kapon kun surprizo kaj kun rideto ekrigardis la nekonatan sinjoron.

— Hejme en la naŭa horo de vespero? Hejme en la naŭa horo de vespero? ripetadis li. — Ho, dio bona, de kie vi venis por fari similan demandon? Post la dua horo sinjoro Marko Antonio eliris, laŭ sia kutimo, kun sinjoro Pietro Are­tino kaj ili certe ne revenos antaŭ la dua aŭ tria horo de mateno.

— Jen kiel via majstro respektas kaj perfektigas la arton! Li ĝin rigardas sekve nur kiel la rimedon por kovri la elspezojn de siaj diboĉoj? ... Bone, mi revenos morgaŭ matene.

La sekvantan matenon la nekonata homo efektive revenis. Tiun ĉi fo­jon li trovis Markon Antonion.

— Saluton! diris li malĝentile.

La juna kaj eleganta gravuristo eĉ ne favoris levi la kapon por respondi la saluton de la nekonata.

— Mi estas germano, sinjoro, kaj mi aĉetis en Nürnbargo kolekton da gravuroj de Albrecht Dürer; kelkaj el la laste publikitaj ĉe mi tamen mankas, kaj oni diris al mi, ke vi povus ilin liveri al mi.

— Tio ĉi efektive estas ebla, respondis Marko Antonio; sed tio ĉi ri­latas mian lernanton, ne min. Volu vin turni al tiu ĉi junulo.

— Por posedi tiel belajn depresaĵojn de l' verkoj de Albrecht Dürer, — daŭrigis la nekonata, foliante la gravurojn, prezentitajn al li de la lernanto, — estas necesa, ke vi havu oftajn komunikigojn kun Germanujo kaj sendube kun Albrecht Dürer mem.

— Kaj tiuj ĉi komunikigoj efektive ekzistas, — kuraĝe respondis Marko Antonio. — Mi interŝanĝas la depresaĵojn de miaj gravuroj kun la depresaĵoj de la gravuroj de Albrecht Dürer; li estas mia amiko, ĉar inter tiaj kontraŭuloj, kiel ni, povas ekzisti nur la amikeco.

— Ho! Dio mia! — interrompis la nekonata; — kion mi vidas! Al­brecht Dürer estas homo tute neinda je via amikeco!

— Kial?

— Li estas fripono!

— Sed, sinjoro! ...

— Homo malestiminda kaj plej malhonesta.

— Sinjoro, Albrecht Dürer estas mia amiko, kaj mi ne povas toleri, ke oni lin insultas antaŭ mi.

— Li estas fripono, mi diras al vi: Vi kredas, ke li donas al vi la depresaĵojn de siaj gravuroj? Ĉu ne? Vi ricevas de li nur la kopiojn, fari­tajn, bone aŭ malbone, de la plej meza el liaj lernantoj.

Marko Antonio ruĝiĝis kaj konfuziĝis.

— Kiel do vi, gravuristo tiel talenta, permesis vin kapti tiel neartifike? Jen, rigardu tiun ĉi *vierge au singe* kaj komparu ĝin kun la depresaĵo, kiun mi alportis el Nürnbargo. Nun diru, ĉu la gravuro, kiun vi pensas esti de Albrecht Dürer, estas komparinda kun la mia? Ĉu vi trovos tie la saman forton, la saman gracion, la saman purecon de la trajto? Al tiu ĉi akvo, vi vidas bone, mankas la travidebleco, al la perspektivo mankas aero, al la ma­dono mankas gracio, al la infano mankas naiveco. Vidu, kiel nekorektaj kaj krudaj estas la konturoj! Oni diros, ke via depresaĵo estis gravurita per malakra gravurilo; en la alia oni rekonos la tutan forton kaj kuraĝon de l' majstro.

— Efektive! — murmuris Marko Antonio, — vi estas prava! Albrecht Dürer trompis min.

— Albrecht Dürer ne trompis vin, sinjoro! Vi trompas la publikon,

tiun ĉi malsaĝan publikon, kiu ne scias fari diferencon inter la verko de la artisto, laboranta por la estonteco, kaj la verko de la diboĉulo, vendanta sian talenton, se li nur havas ĝin, al la malindaĵoj de Aretino kaj Julio Romain'o! Jes, Marko Antonio Raimondi, vi estas pseŭdonomulo; vi ŝtelis la nomon de alia; vi ŝtelis la mian nomon, ĉar mi estas Albrecht Dürer.

Marko Antonio, pala kaj neniigita, refalis sian seĝon, de kiu li leviĝis kun kolero.

— Kaj mi trovos la justecon, kaj la tuta Eŭropo scios viajn mizerajn artifikojn. Kaj mi faros, ke via nomo estos nedividebla de la mia. Aŭskultu, Marko Antonio Raimondi: jen kia estos via titolo inter la posteuloj: "Li estas tiu, kiu ŝtelis la nomon de Albrecht Dürer kaj kiu malhonestigis sian gravurilon per la malĉastaj desegnaĵoj de Julio Romain kaj de l' malhonesta libro de Aretino: ŝtelisto kaj diboĉulo."

Poste li eliris.

De Marko Antonio iris Albrecht Dürer al la senato de Venizo kaj plendis kontraŭ la uzurpanto de sia subskribo.

La senato tuj faris la decidon kaj malpermesis al Marko Antonio kontraŭfari la subskribon kaj la monogramon de Albrecht Dürer, minacante per la plej severaj punoj.

Ĝi ordonis krom tio al la juĝaj oficistoj bruligi ĉiujn kontraŭfaritajn gravurojn.

La tuta Italujo sin okupis je tiu ĉi afero kaj prenis la partion de Albrecht Dürer.

La papo Klemento VII, sciigita pri la hontinda ŝtelo de Marko Antonio, ĵetis lin en la malliberejon, uzante la pretekston, ke li gravuris malĉastajn estampojn, kaj longe tenis lin en mallibero.

Albrecht Dürer, vengita kaj kovrita per honoroj, revenis en sian landon, restinte dum tri monatoj en Venizo kaj Romo.

Marko Antonio, malgraŭ la tuta brilo de sia talento, neniam povis forgesigi sian konduton rilate Albrecht Dürer, kaj kelkaj tiamaj historiistoj ne skribis lian nomon alie, ol kun la aldono: *ŝtelisto*.

En nia tempo en Francujo li estus por simila kulpo kondamnita en la juĝejo pagi 200 frankojn da malprofito kaj juĝaj elspezoj, kaj tio nur post longa kaj multekosta por Albrecht Dürer proceso, kaj poste neniu riproĉus lian konduton, neniu konservus eĉ la plej malgrandan rememoron pri ĝi, neniu, eble, gardus sin de ĝi.

Tio ĉi estas tial, ke la arto estis tiam objekto de la unuanima kaj pia adoro de la flanko de artisto kaj publiko.

Dume en niaj tagoj artisto kaj publiko faris la arton metio, kies produktoj estas *vendataj* kaj *aĉetataj*, kaj nenio pli.

El lingvo franca tradukis G.

El Lermontov.

I.

Ĉe pordo de la loko sankta
petaj, de malriĉulo sonis;
li staris pala, suferanta,
laciĝa, panon nur petanta...
Ŝtoneton iu al li donis.

Mi tiel petis amon vian,
kun ploroj, kun malgajo petis...
Kaj la plej bonan senton mian
vi tiel je etern' forĵetis!

S. Sviridov.

Nova enciklopedio.

(Daŭrigo el n:o 6—7 de 1897.)

- ADIAU:** por viroj — signo de disiĝo, por virinoj — signo de nova interparolado.
- AGO:** kiam eminenta sinjoro komencas aĝiĝi, falas arĝento en lian haron, purpuro sur lian nazon kaj stelo sur lian bruston.
- AMO:** haluzinacio, kiu igas prudentajn homojn kredi, ke ili povas krei hejmon per petrolokuirilo kaj kanario.
- AMO KAJ VINO** estas amikoj; sed la amo devas esti juna kaj la vino maljuna.
- APETITO** venas dum la manĝado.
- ĈAGRENO** sekvas kiam ambicio kondukas.
- ĈASO:** danĝera por ĉasaĵo, krom en la dimanĉoj.
- DEVO:** io, kion oni postulas de aliaj.
- “DOLCE FAR NIENTE“:** sidi senlabora kaj rigardi iun kiu laboras.
- EKDECIDO KAJ AGO:** estas 1 por la viro, 2 por la virino kaj... 99 por nia redakcio!*)
- ERARO** pro kristamo estas virto, eraro pro monamo estas krimo.
- FELIĈO:** rompebla veturilo, kiu iam iun helpas antaŭen, sed la amasonĵetas en la kanaleton ĉe la vojo.
- FELIĈO:** kvamkam la feliĉo frapas unufoje la pordon de ĉiu homo, tamen ĝi ne certe laŭte frapas.
- FILOZOFIO KAJ POEZIO:** filozofio enmetas fenestron al homoj, poezio — fornon.
- FORGESO:** sin forgesi — la plej granda feliĉo; esti forgesita — la plej granda sufero.
- FORTO** nia sufiĉas por malfeliĉo de aliaj, sed ne por ilia feliĉo.
- GENIO** estas lima, malgenio senlima.
- ĜENTILULO:** homo kiu diras kion li ne opinias.
- HOMO** estas la sola, kiu povas dubigi nin je Dio.
- KALUMNIO** estas iam permesinda al homoj, neniam al homo.
- KISO** estas danĝera ne sole pro la mikrobaj.
- KOLERO:** estas rimarkinde, kiel facile renebla estas la kolero, kiam la kontraŭulo estas la pliforta.
- KOMITATO:** se Dio formus komitaton por la kreado de la mondo, la universo ankoraŭ ne estus preta.
- KRISTANO:** nenio tiom similas al kristano, kiel idolano faranta krucosignon.
- KURAGO:** batali per la glavingo kiam estas disrompita la glavo.
- MALBONULOJ** estas preferindaj antaŭ senŝaguloj, ĉar la unuaj iam ripozigas.
- MALSAGECON** vane kontraŭbatalas eĉ la dioj.
- MATENO:** simile al iaj virinoj, havas oron en la buŝo.
- MEMMORTIGANTO:** ofero, kiu trafas sian ekzekutanton kaj lin mortigas.
- MENSOGADO:** oni mensogas plej *antaŭ* politika elekto, *dum* militado kaj *post* ĉaso.
- MONOJN** pli bone almozedoni, ol pruntedoni! Dono kreas sendankemulojn, prunto kreas malamikojn.
- MORTO:** multaj homoj mortas ne kreintaj ion, neniu mortas ne detruinta ion.
- MOSKVO:** Romo tatara.
- OPERO:** la plej maljuna — “la Postiljono“, ĉar ĝin skribis Adam; la plej muzika — “la Afrikanino“, ĉar en ĝi eĉ la ŝipo kantas.
- OPINIOJ:** najloj, kiujn oni enigis des pli profunde, ju pli oni ilin surbatas; tial evitu disputojn!
- PAPEROKORBO:** tombo de esperoj.
- PESIMISTO:** homo, kiu ne kuraĝas elrigardi gaje pro timo ke iu pruntepetos de li monon.
- POLITIKISTOJ:** publikaj akvoverŝistoj, kiuj povas krei koton kiam la suno lumas, sed ne sunlumon kiam troviĝas koto.
- PROKRASTECO** tranĉas sian glacieron somere.
- PUGNOBATO** ĉiam estas malagrabla, sed plej malagrabla kiam ĝi trafas la nazon.
- RELIGIO KAJ KULTURO:** batalado.
- RINGO:** sur fingro de virino signifas aŭtokration.
- SOCIALISMO:** leĝodevigita egaleco en homa riĉeco kaj homa mizereco.
- SOCIETO** konsistas el du grandaj klasoj — tiuj, kiuj havas pli da apetito ol manĝaĵo, kaj tiuj, kiuj havas pli da manĝaĵo ol apetito.
- VANTULO** ne ekzistas, kiu samtempe ne estas malgranda homo.
- VIRINO:** la lasta, laŭ la biblio, kreitaĵo de Dio. Eble, — ĉar oni povas vidi ke Li estis laca.
- Vivo:** ju pli ni levigas en ĝi, des pli malvarma ĝi estas.

P. Ahlberg.

*) Ni dankegas nian estimatan kunlaboranton por la ĝentilaĵo iom originala
La red.



Senlaboraĵo.

E. Zola.

I.

Kiam la laboristoj matene venis en la laborejon ili ĝin trovis malvarman, kiel la mallumaĵon de malgaja ruino. En profundo de l' granda laborejo la maŝino estas silenta kun siaj maldikaj teniloj, kun siaj radoj nemoveblaj; kaj ĝi metas tie-ĉi melankolion, ĝi kies fajfado kaj bruado ordinare animigas la tutan domon je la bato de l' koro de grandegulo, tiel severa ĉe la laborado.

La patrono eliris el sia kabineto. Kun malgaja voĉo diris li al laboristoj:

Miaj infanoj, ni ne havas hodiaŭ plu da laboro... Ni ne havas novajn mendojn, de ĉie mi ricevas nur kontraŭordonojn kaj mi devas resti kun komercaĵo sur miaj manoj. Tiu-ĉi monato de decembro, je kiu mi tiel kalkulis, tiu-ĉi monato de granda laboro en antaŭaj jaroj, nun minacas per ruinaĵo al la plej solidaj firmoj... Oni devas ĉion haltigi.

Kaj, vidante, ke la laboristoj sin rigardas kun timo de reveno hejmen, kun timo de morgaŭa malsato, li aldonas je tono pli mallaŭta:

— Mi ne estas egoisto, ne, mi al vi tion-ĉi ĵuras... Mia situacio estas ankaŭ terura, — povas esti, pli terura ol via. En ok tagoj mi perdis 50,000 frankojn. Mi devas nun haltigi la laboron por ne fari profundaĵon pli grandan; kaj nun mi ne havas eĉ la unuan suon de miaj pagoj de la 15:a... Vi vidas, mi parolas kun vi amike, nenion mi kaŝas...

Morgaŭ, kredeble, la policistoj estos jam tie-ĉi. Sed tio-ĉi ne estas nia eraro, ĉu ne vere?... Ni batalis ĝis fino. Mi volus helpi al vi pasigi tiun-ĉi momenton, sed ĉio jam finita, mi mem estas ĉe tero, mi ne havas panon por divido kun vi...

Kaj tiam li donas al ili sian manon. Silente premis ĝin la laboristoj. Kaj kelkajn minutojn ili restas tie-ĉi, kun pugnoj premitaj, rigardante nun jam senutilajn laborilojn. Aliajn matenojn, de frua tago, la segiletoj kantis, marteloj ritme falis, kaj nun tio-ĉi jam ŝajnas dormi en polvo de fataleco. Dudek, tridek familioj morgaŭ jam ne manĝos. Kelkaj virinoj staras kun larmoj en okuloj, la viroj volas esti pli fortaj. La lastaj vigligas ilin kaj diras, ke oni ne mortas en Parizo pro malsato.

Kaj poste, vidante ke la patrono forlasas ilin, fleksita en tiuj-ĉi ok tagoj, disbatita per malfeliĉo eble ankoraŭ pli granda ol li mem diras, ili sin retiras unu post unu, sufokigante sin tie-ĉi, kun premita gorgo, kun malvarmo en koro, kvazaŭ ili eliras el ĉambro de l' mortinto. La morto, lia laboro, tio-ĉi estas tia granda muta maŝino, kies skeleto, tiel terura vidiĝas en ombro.

II.

Laboristo estas ekstere, en la strato, sur pavimo. Jam tutan semajnon li batis la trotuaron ne povante trovi laboron. Li iris de pordo al pordo, proponante siajn brakojn, siajn manojn, sin tutan por kia ajn laboro, eĉ la plej abomena, la plej laciga, la plej mortigebla. Ĉiuj pordoj sin fermis.

Tiam li proponis labori por duona pago. La pordoj sin ne malfermis. Li laborus eĉ por nenio, nur por ke oni lin prenu. Tio-ĉi estas la senlaboraĵo, terura senlaboraĵo, kiu sonas, kiel funebra sonoro en la mansardoj. La paniko haltigis ĉiujn industriojn kaj la mono, tiu-ĉi multimema mono kaŝis sin.

Ĉe la fino de semajno ĉio jam estas tute finita. La laboristo faris la lastan penon kaj li jam revenas malrapide, kun manoj malplenaj, konsumita de mizero. Ĝi pluvas, kaj en tiu-ĉi vespero Parizo estas funebra en sia koto. Li marŝas en pluvego kaj ne sentas ĝin, aŭdante nur sian malsaton, sin haltante por veni pli malfrue. Li klinigis sin sur balustrado de la Sejno; la grandaj ondoj fluas kun longa bruo, ŝprucoj de blanka ŝaŭmo sin disŝiras je la kolonoj de l' ponto. Li sin klinigas pluen, la fluego lin vokas per furioza apelo. Sed poste li al si diras, ke tio-ĉi estas malinda kaj timema, kaj reiras.

La pluvo ĉesis. La gazo flamas en la vitroj de juvelejoj. Se li nur disrompus unu vitron, li prenus per unu pugno panon por kelkaj jaroj. La kuirejoj de restoracioj eklumiĝis, kaj post la kurtenoj de blanka muslino li vidis homojn manĝantajn. Li rapidigas siajn paŝojn, li iras supren al antaŭurbo preter viandoj, kolbasejoj, panejoj, preter tuta Parizo manĝegula, kiu vantas en horoj de malsato.

Ĉar la edzino kaj la filneto ploris matene, li promesis al ili panon por la vespero. Li ne kuraĝis reveni kaj diri, ke li mensogis, antaŭ la veno de nokto. Ĉiam marŝante li sin demandis, kiel li venos, kion li diros por devigi ilin ankoraŭ toleri. Sed ili jam ne povas plu resti sen manĝo. Li mem, li provos, sed ŝi, lia edzino, lia filneto — ili ne povas — ili estas tiel malfortaj.

Kaj subite li havis ideon peti almozon. Sed kiam sinjorino aŭ sinjoro iras preter li kaj li jam decidas eltendi la manon, lia brako rigidiĝas, lia gorĝo sin premas. Li restas nemovebla sur trotuaro, dum la pasantoj "*comme il faut*", vidante lian teruran de l' malsato vizaĝon, sin deturnas, pensante ke li estas malsobra.

III.

La laboristedzino sin mallevis ĉe l' sojlo de la porto, lasinte supre la filneton ekdormintan. La virino estas tute maldika, en kalikota vesto. Ŝi tremas en la fajfoj glaciaj de la strato.

Ŝi havas jam nenion en la loĝejo; ĉion ŝi jam elportis en pruntejon (*mont-de-piété*). Ok tagoj sen laboro sufiĉas por dismalplenigi la loĝejon. Antaŭtage ŝi vendis al ĉifonisto la lastan restaĵon de lano de ŝia matraco; kaj tiel foriris la tuta matraco kaj nun restas nur la tolo. Ŝi ĝin alkrōcis al fenestro por malhelpi al vento eniranta, ĉar la filneto ĉiam tusas.

Nenion dirante al sia edzo, ŝi ŝerĉis de sia flanko. Sed la senlaboraĵo frapis la virinojn ankoraŭ pli kruele ol la virojn. Sur la sojlo ŝi aŭdis malfeliĉulinojn esplorantajn la tutan nokton. Ŝi renkontis unu starantan en la angulo de trotuaro, alia estas jam morta, alia malaperis.

Ŝi, feliĉe, havas bonan viron, edzon, kiu ne drinkas.

Ili estus bonaranĝitaj, se tiuj ĉi mortaj sezonoj ilin ne tute ruinigus. Ŝi jam ekuzis ĉian krediton: ŝi ŝuldas al panisto, fruktisto, viandisto kaj ŝi ne kuraĝas eĉ preteriri la butikojn. Post tagmezo ŝi iris ĉe sia fratino por prunti unu frankon, sed tie ŝi trovis tielan mizeron, ke ŝi komencis, nenion dirante, plori kaj tiel, ili ambaŭ, ŝi kaj ŝia fratino longtempe kune ploris. Kaj poste, forirante, ŝi eĉ promesis alporti pecon da pano, se ŝia edzo revenos kun io.

Ŝia edzo ne venas. La pluvo falas, ŝi venas al sia pordo; sub ŝiaj piedoj bruas kotaj fluoj de akvo, la akvo penetras ŝian maldikan veston. Je momentoj, ŝi malpacientiĝas kaj malgraŭ pluvego ŝi eliras, iras ĝis lu fino de l'

strato por vidi, ĉu ŝi ne ekrimarkos tiun, kiun ŝi atendas tie, malproksime. Kaj kiam ŝi revenas, ŝi estas ekmalsekita. Ŝi pasigas siajn manojn sur la haroj por sekigi ilin; kaj ree pacience atendas ŝi, ekskuinta per mallongaj febraj tremoj.

La preterirantaj ŝin tuŝetis. Ŝi sin faris tute malgranda por nenium ĝeni. La viroj rigardis ŝin rekte vizaĝon kaj momente ŝi sentis la varman spiron, kiu iras ĝis ŝia kolo. La tuta suspekta Parizo, la strato kun sia angulo, siaj humidaj lumaĵoj, siaj kaleŝoj rulantaj, ŝajnis voli ŝin preni kaj ĵeti en fluon. Ŝi havas malsaton. Kontraŭe estas panejo kaj ŝi pensas pri la flineto, kiu tie dormas supre.

Kaj kiam fine l' edzo montriĝas, sin trenante kiel mizerulo laŭlonge la domoj, ŝi sin ĵetas al li, ŝi lin demande rigardas.

— Nu? — murmuris ŝi.

Li nenion respondis, mallevinte la kapon. Tiam, ŝi supreniras unua, pala kiel mortinta.

IV.

Supre, la flineto ne dormas. Ŝi revekiĝis, ŝi revas ĉe resto de kandelo agonianta sur angulo de tablo. Kaj oni ne scias, kio terura kaj malgajega sin pasas antaŭ tiu-ĉi malgrandulino seĝara kun trajtoj velkitaj kaj seriozaj de matura virino.

Ŝi sidiĝas zur bordo de l' korbo, kiu servas al ŝi por kuŝo. Ŝiaj piedoj nudaj pendas tremantaj; ŝiaj manoj de pupo malsanema tiras al sia brusto la ĉifonojn, kiuj ŝin kovras. Ŝi sentas tie-ĉi brulaĵon, fajron, kiun ŝi volas estingi. Ŝi revas.

Neniam havis ŝi ludilojn. Ŝi ne povis iri lernejon, ĉar ŝi ne havas ŝuojn. Pli malgrandan, ŝi rememoriĝas, la patrino ŝin prenis promeni je suno. Sed tio-ĉi estas malproksime. Oni devis transloĝiĝi, kaj de tiu-ĉi tempo, ŝajnas ke granda malvarmo fajfas en la domo. De tiam, ŝi neniam estis plu kontenta — ĉiam ŝi havas malsaton.

Tio-ĉi estas io profunda, kien ŝi malleviĝas nenion komprenante. Ĉu ĉiuj do havas malsaton? Ŝi tamen penis kutimiĝi kun tio-ĉi, sed ŝi ne povis. Ŝi pensas, ke ŝi estas ankoraŭ tro malgranda, oni devas esti pli granda por scii. Ŝia patrino, sendube, scias tion-ĉi, kion oni kaŝas de infanoj. Se ŝi kuraĝos, ŝi demandos ŝin, kiu metas vin tiel en mondon por ke vi havu malsaton.

Kaj ĉio estas tiel mizera, ĉe ili. Ŝi rigardas fenestron, kie sin batas tolo de matraco, la murojn nudajn, la meblon laman, la tutan honton de mansardo, kiun la senlaboraĵo kotigas per sia malespero. En sia malklereco, ŝi kredas ke ŝi revis pri ĉambroj varmaj kun belaj objektoj brilantaj; ŝi fermis la okulojn por revidi ĉion-ĉi; kaj tra ŝiaj malgrandigitaj palpebroj la lumeto de l' kandelo fariĝis granda ora lumo, kien ŝi volis eniri. Sed la vintro fajfis, fariĝis tiela fluo d'aero el la fenestro, ke ŝi komencis terure tusi. Ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj.

Iam ŝi timis, kiam oni ŝin lasis solan; nun do, ŝi tion ĉi ne scias, ĉio por ŝi estas egala. Ĉar ili ne manĝis de l' antaŭtago, ŝi pensas ke la patrino iris serĉi panon. Kaj tiu-ĉi ideo ŝin amuzas. Ŝi distranĉos sian panon en malgrandaj pecetoj, ŝi ilin prenos malrapide unu post unu. Ŝi ludos kun sia pano.

La patrino venis, la patro fermis la pordon. La filineto ilin rigardas kun manoj tenitaj al ili ambaŭ, tre mirita.

Kaj ĉar ili nenion diras, post unu momento, ŝi repetas per sia voĉo kantanta:

— Mi havas malsaton, mi malsatiĝas.

La patro sin prenis la kapon per la manoj, premataj en pugnoj, en ombra angulo: li restas tie-ĉi, disbatita, ŝultrojn skuante per silentaj ploregoj. La patrino, sufokante siajn larmojn, venis rekuŝigi la filineton. Ŝi kovras ŝin per ĉiuj vestrestaĵoj de la loĝejo kaj diras al ŝi esti saĝa, ekdormi. Sed la infano, kiu pro malvarmo krakis per dentoj, kaj sentas ke la fajro en la brusto disbruliĝas pli forte, fariĝas pli kuraĝa. Ŝi sin pendas je l' kolo de la patrino kaj demandis tre mallaŭte: — diru, patrineto, kial do ni havas malsaton?

Tradukis **A. M. Grünfeld.**

Malriĉulo.

El "Versaĵoj en prozo" de *I. S. Turgeniev.*

Mi iris sur la strato . . . Min haltigis unu maljuna kaduka malriĉulo. Brulumitaj okuloj, bluigitaj lipoj, dissiritaj ĉifonoj, malpuraj vundoj . . . Ho, kiel malbelege ĉirkaŭmanĝis la malriĉeco tiun ĉi ekzistaĵon!

Li eltiris al mi ruĝan, ŝvelitan, malpuran manon . . . Li ĝemis, li petegis helpaĵon.

Mi komencis palpi en ĉiuj miaj poŝoj . . . Nek monujon, nek horloĝon, eĉ nek la naztukon . . . Mi nenion prenis kun mi.

Kaj la malriĉulo ĉion atendis . . . kaj la eltirita lia mano sin balancis kaj ekstremadis.

Perdita, konfuzita mi ekpremis tiun ĉi malpuran, tremantan manon . . . "Ne plendu, frato; nenion mi havas, frato."

La malriĉulo ekrigardis min per siaj brulumitaj okuloj; liaj bluaj lipoj ekridetis — kaj li, en sia vico, ekpremis miajn malvarmajn fingrojn.

Kio do, frato — ekdiris li mallaŭte — ankaŭ por tio ĉi min Vin dankas. Tio ĉi ankaŭ estas almozo, frato.

Mi komprenis ke mi ankaŭ ricevis almozon de mia frato.

Trad. **G. Slucki.**

Floro printempa.

La tempo printempa revenis,
Vekiĝis la tuta natur'.
Jen vivan movadon alprenis
Nun ĉia en mond' kreatur'.

Sed kial en koro, en mia
Sentita ne estas ekscit'?
De l' mondo, de l' festo do ĝia
Al ĝi ne aliris invit'?

Majo 1898.

La stato de nia homaro
Ne ŝajnas progresi al mi,
Ĝi dormas en ĝia eraro,
Ne venas printempo al ĝi.

Sed levis sin jen unu floro,
De ar' esperanta labor',
Per ĝia viviga odoro
Sin levis, altiris la kor'.

B. Kaplan.

Adresaro de niaj abonantoj 1898.

(Daŭrigo.)

La numero, metita antaŭ ĉiu nomo, estas tiu numero, sub kiu la abonanto estas enskribita en la abona libro.

Aŭstrujo-Hungarujo.

376. **Jakab, Lajos**, fervoja oficisto. (Fertő-u. 4 sz.). *Szeged* (Hungarujo).

Belgujo.

383. **Woyde, Waclaw**. 37, Rue Longue d'Herenthals. *Anvers*.

Francujo.

389. **Chavet, Gabriel**. Collège de *Louhans* (Saône-et-Loire).
433. "l'Étranger". 77, Rue Denfert-Rochereau. *Paris*.
434. "l'Humanité Intégrale". 20, Avenue Trudaine. *Paris*.
390. **Husson, H.** 125, Rue N. D. des Champs. *Paris*.
386. **Laignier, Marcel**. 59, Rue Libergier. *Reims* (Marne).
387. **de Maigret, B. G.** *Epernay* (Marne).
432. **Vinot, Joseph**, directeur du "Journal du Ciel". Cour de Rohan, boulevard Saint-Germain, 130. *Paris*.
388. S-rino **Zabilon d'Her**. 11, Rue Jarente. *Lyon* (Rhône).

Germanujo.

375. **Sittler, P.** *Kolmar* (Elsass).

Rusujo.

418. **Andrjeevski, doktoro**. *Kobrin* (gub. de Grodno).
428. **Bahhtin, Nikolaj Nikolajevič**, kaptano. Kadetski korpus. *Orel*.
407. S-rino **Bernštejn, A. G.** *Jalta*.
401. S-rino **Bramm, Sofja Andrejevna**. Nadejdinskaja ul., gimnazia Berezinoj. *Odessa*.
403. Ĉitalnja Jaltinskaho Obŝeestvennaho Sobranija i Kurzala. *Jalta*.
414. **Danilov, V. I.** Dvorjanskaja ul., dom Erastova, kv. Krivcova. *Patigorsk* (Terskaja obl.).
406. S-rino **Davidenko, N. V.** Dom Kočubeja. *Jalta*.
427. **Diakonov, Nikolaj Vassiljevič**. Vassilievski Ostrov, 3 linia, 48. *S. Peterburg*.
392. S-rino **Frankovskaja, T. F.** Sobornaja ul., dom Bjalinickaho-Biruli. *Sevastopol*.
397. **Frolov, G. N.**, maŝinist depo Vitebsk-Rigo-Orlovskoj ŝel. dorogi. *Vitebsk*.

409. **Gontarski, N.** Fabrika "Varta". *Čenstokov* (gub. de Petrokov).
413. **Gorbunov, Vl.** Fabrika br. Balaŝoviŝ. St. *Drezna* (Mosk.-Nijeg. j. d.). [V. Laskin].
393. **Jezerki, M.** *Volkovisk* (gub. de Grodno).
419. **Kadik, P.** Mujskaja Gimnazia. *Krasnojarsk*.
431. **Kavecki, Sergievskaja 3, loĝ. 2.** *S. Peterburg*.
404. **Kicinski, V. I.** Imperatorski Nikitski Sad. *Jalta*.
426. Generalo de l' Infanterio **Kouzminski, Pavel Vassiljevič**. 2 rota, Izmajlovskaho polka, 15. *S. Peterburg*.
382. **Kurnatovski, Olgierd.** *Kolnica* per *Kolo* (gub. Kaliska).
412. **Laskin, Iv.** Fabrika br. Balaŝoviŝ, st. *Drezna* (Mosk.-Nijeg. j. d.). [V. Laskin].
410 kaj 422. **Laskin, V.** Proginnazio. *Roslavl* (gub. de Smolensk). [5 ekz.].
398. **Levicki, Andrej Iljič**, akcizni ĉinovnik. *Ananjev* (gub. de Ĥerson).
377. **Löfgren, Carl.** *Jekaterinburg* (gub. de Perm).
381. **Matusevič, Tomaŝ.** Zabalkanski prospekt, d. 49, loĝ. 22. *S. Peterburg*.
430. **de Maynov, Vladimir Vl.** Sergiev-3, loĝ. 2. *S. Peterburg*.
405. S-rino **Nemm, A. E.** Dom Kočubeja. *Jalta*.
402. **Ostrovski, I. D.**, doktoro. *Jalta*.
416. **Petrajevski, K. K.**, poruĉik Ĥvalinskaho rezervnaho bataljona. *Saratov*.
425. **Piletski, V.** Bolŝaja Nikolskaja, 35. *Smolensk*.
400. **Pokrovski, V. D.** Petropavlovski pereulok, cerkovni dom n-ro 9. *Nijni-Novgorod*.
420. M:elle **Polnickaja, Anna Feodorovna**. Stremjannaja, dom n-ro 4, loĝ. 4. *S. Peterburg*.
391. **Raekson, Jak.** Tra *Feilin*, Pajstel, Karli (gub. Liflanskaja).
424. **Reyssier, Laurent.** Nevski 50. *S. Peterburg*.
421. **Rogačev, Vassilij Konstantinovič**. Kazanskaja, dom n-ro 26—27, loĝ. 52. *S. Peterburg*.
411. **Rožanov, N.** Ŝeremetjevskaja Bolnica n-ro 15. *Moskva* [V. Laskin].

394. Rosseter, I. Perevoločenskij polk. *Zvenihorodka* (gub. de Kiev).
396. Ruma, Leopold Nikolajevič. *Votkinski Zavod* (gub. de Vjatka).
423. Slavjanskij, Vladimir Ivanovič. Nevski Zdanie Doumie. *S. Peterburg*.
378. Slucki, Greguar. *Elsavetgrad*.
417. Spektor, Boruh. *Teplik* (gub. Podolskaja).
429. Stepanov, kapitano. Voenni Transport "Ssamoiied". *Revel*.
415. Strjalkovski, E. F., apotekisto. *Zavod Nerčinski* (Zabajkalskaja obl.).
384. S-rino Sviridov, Sofja Aleksandrovna. *Luga* (gub. de S. Peterburg).
408. S-rino Sviridova, Sofja Aleksandrovna. Bolšaja Moskovskaja ul., dom. n-ro 13, kv. n-ro 48. *S. Peterburg*.
399. Tec, Vladimir Andrejevič. Kontora l:ho učastka slujbi puti. Stancia *Ob* (Sredne-Sibirskoj jel. dorogi).
395. Visocki, V. K. Gubernskaja Zemskaja Uprava. *Simferopol*.
379. Vladikin, F. N. Starorusskij ujezd. Stancia *Vasilejščima* (gub. Novgorodskaja).

Sud-Afriko.

436. Filén, Ragnar. Swedish and Norwegian General Consulate. *Capetown* (South-Africa).

Svedujo.

437. Johanson, Harald. 24, Regeringsgatan. *Stockholm*.
435. Malmkvist, Gustaf, redaktoro de "Svensk Årskrönika". *Örebro*.
380. Olson, Engelbrekt, inĝeniero. Pipersgatan 11. *Stockholm*.
385. Wijk, Gunnar. Brogården. *Skara*.

Poŝtaj abonantoj en Svedujo.

- I. Kyhler, Nath., agronomisto. *Köinge*.
II. Sahlin, Gustaf. *Kalmar*.
III. Sjösteen, Gustaf, en la redakcio de "Göteborgs Handels- och Sjöfartstidning". *Göteborg*.
IV. Vahlström, Vilhelm. *Söderhamn*.
V—XVI. Nekonataj.

Ŝanĝitaj adresoj de abonantoj.

8. Sapojnikov, M. M. Kontoro de konstruado de P.-M. fervojo. *Kašira* (gub. Tula), Rusujo.
65. Stalberg, Herman. Peterburskaja ul. dom. Ŝtejnbeke. *Vezenberg*, Rusujo.
187. Halcov, I. M. St. *Komariči* (gub. de Orel), Rusujo.
197. Zakirjevski, A. Troickij prospekt, domo de Ananin. *Arĥangelsk*, Rusujo.

Informejo de esperantistoj.

Korespondadi kun alilandanoj deziras:

Fraŭlino *Marie Moisseney*. Grand rue. *Louhans* (Saône-et-Loire), Francujo [naskita en 1875 jaro].

Fraŭlino *Marie Thibert*. Grand rue. *Louhans* (Saône-et-Loire), Francujo [naskita en 1875].

Sinjoro Paul Blajevič. Smolensk. Rusujo (klasiĉeskaja gimnazija, uĉenika VII klasa).

Deziras korespondadi kun varmegaj esperantistoj s-ro *V. Tacievski*, Fontannaja ul. N:o 112, *Simferopol*, Rusujo;

kun eksterlandaj esperantistoj s-ro *M. Rehnberger*, instruisto, *Sandviken*, Svedujo.

— S-ro *Dmitrii Nikolaevič Andronov* en Pjasnitskaja ul., domo de Davidov, kv. de Andronov, *Moskva*.

Korespondadi kun esperantistoj de ĉiuj landoj deziras s-ro *Betegh Imre* en *Csicsó-Keresztur*, Hungarujo.

Agentoj de la lingvo Esperanto:

27. S-ro *Gunnar Wijk*, Brogården, *Skara*, Svedujo.

ANONCOJ.

La gazeton *Lingvo Internacia* oni abonas:

- en Ameriko ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ Francujo ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ Germanujo ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ Portugalujo ĉe d-ro Costa e Almeida, *Rezende*.
- „ Rusujo ĉe V. Gernet, Jamskaja, 92, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.
En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Al atento de la rusaj esperantistoj.

Per Esperanto.

Nova, perfekta, simpligita, tre facile ellernata metodo de Rusa Stenografio de J. A. Ĵivotovski en kvin leteraj lecionoj. La kondiĉojn kaj prospekton oni elsendas senpage.

Odessa, Maly per. N:o 1.

Al J. A. Ĵivotovski.

Danke al Esperanto.

Speciala instruado de

Librotenado

kaj komercaj kalkuloj

per korespondado en lingvoj: rusa kaj hebrea. La rekompenco estas tre modera. Prospektojn kaj provajn leterojn mi sendas al ĉiu, kiu sciigas min pri sia adreso.

Mia adreso estas:

Julius Levik, Berdiĉev (Rusujo).

L'Espérantiste

monata gazeto

publikigata en la franca kaj esperanta lingvoj

havas la celon propagandi Esperanton en la landoj uzantaj la lingvon francan kaj ĝenerale apud ĉiuj komprenantaj tiun ĉi lingvon. Per tekstoj kaj konsiloj specialaj, ĝi potence helpadas al la adeptoj pri la perfekta akiro de Esperanto.

Por ricevi *L'Espérantiste* oni povas:

aŭ simple aboni ĝin (3 fr. en Francujo; 3 fr. 50 en la aliaj landoj) — aŭ fariĝi membro de la Societo por la propagando de Esperanto (4 fr. por jara enpago).

Sin turni al S-ro René Lemaire, sekretario de l' societo, en Epernay (Marne), Francujo.

Estas riceveblaj ĉe A. Zakrĵevski sek-vantaj verkoj. 1) Plena lernolibro por rusoj (n:o 77) — 15 kop. 2) *Kain* — 1 fr. = 70 öre = 80 pfen. = 40 kop. 3) Regularo de la societo "Espero" — 7 kop. 4) Propagandaj broŝuroj (n:o 85) — 2 kop. 5) "Lingvo Internacia" por la jaro 1896 (unu ekzempl.)

Enhavo de tiu ĉi numero.

	paĝo		paĝo
<i>Biblioteko de esperantistoj de M. S.</i>		<i>El Lermontov de S. Sviridov</i>	120
<i>Rakitski</i>	113	<i>Nova enciklopedio de P. Ahlberg</i>	121
<i>Novajoj</i>	114	<i>Senlaborajo de A. M. Grünfeld</i> (trad.)	122
<i>La malhelpita bigamio de P. Lengyel</i>	117	<i>Matriculo de G. Slucki</i> (trad.)	125
<i>Pri traduko de la Sankta Skribo de V. Tacievski</i>	118	<i>Floro printempa de B. Kaplan</i>	125
<i>Kontraŭfakcio en XIII:a centjaro de Adrien van Mersel</i>	118	<i>Adresaro de niaj abonantoj 1898</i>	126
		<i>Informejo</i>	127
		<i>Anoncoj</i>	128